



**1(185)  
2022**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Ichok Kacnelson

tradukis Mikaelo Bronŝtejn

## La kanto pri la murdita juda popolo

### Kantu do vian kanton!

Do kantu! Vian harpon en manojn viajn prenu,  
Kaj viajn firmajn fingrojn obeu ĝiaj kordoj,  
Kantiko pri la lastaj eŭropaj judoj venu,  
La psalmo lasta juda de l' funebrantaj koroj.

– Ho, kiel mi ekkantu? Kiel malfermu l' buŝon  
Mi, orfo, kiu perdis du filojn, la edzinon?!  
Nur larmoj de l' hororo animon mian tuŝas.  
Hororo! La perejo min batas en la sinon.

Sed kantu, kantu! Vian rompitan voĉon levu  
Al Li – en ĝemoj viaj kun Li aperos ligo!  
Pri lasta jud' kantikon Li aŭdu, jes, Li devu –  
Pri l' viv', pri la perejo, pri l' mort' sen enterigo...

Sed kantu, kantu – eble, lastfoje sur la Tero,  
La kapon vian levu, la pezon de l' okuloj,  
Kaj kantu, l' harpon ludu por lasta foj', en vero;  
La judoj ne plu estas murditaj de l' fiuloj!

Ho, kiel kantu mi? Kaj la kapon levu – kien?  
La cerbo ne akceptas! Kaj larmo jam sen ploro  
Ne lasas la okulojn, ne lavas veon mian,  
Ne havas forton fali... Sinjoro! Ho, Sinjoro!

Mi petas, kantu, kantu! L' ĉielo alta bluas  
Kvazaŭ Li restas tie, do voku Lin en tristo,  
Kvazaŭ Li feliĉigas, prilumas kaj instruas  
Murditajn homojn siajn. Ekkantu do, kantisto!  
[...]

Al kiu kantu mi do? Al tiu mond' malplena?  
Kaj kiel mi ekludu, se l' manojn levis pie?!  
Sinjoro! Ovru holmojn de l' tero malebena!  
Nur montru, kie kuŝas mortintoj miaj, kie?!

Ekveo do el ŝtonoj, veadu plu el sablo,  
El flamoj kaj el fumoj de l' domoj forbrulintaj –  
Ĝi estas viaj ostoj, ĝi estas via sango,  
La vivoj kaj la korpoj! Ekveo do, mortintoj!  
[...]

Ho montru vin al mi la popolo mortigita,  
La manojn levu vi el tranĉeoj kaj ravinoj,  
Per kalko surverŝita, amase bruligita,  
Ho levu, levu l' manojn el fundo, el ruinoj!

Vi, ĉiuj do – el Beljec, el Aŭŝvic', Treblinko,  
El Sobibor, Ponari, el ĉie, ĉie, ĉie! –  
Eliru el putrejoj, el kot', el marĉa sinko  
Kun veo en okuloj, kun buŝ', ovrita krie –

Alvenu, bruligitoj, pafitoj, muelitoj,  
Ekstaru rondodance en unu rond' senfina –  
Eliru ostoj judaj, en sapon transformitaj,  
Geavoj kaj infanoj en la brakum' patrina.

Revenu ĉiu, ĉiu, al mi vin montru fora  
Mi volas vin revidi, ĵetitajn ĉiulande –  
Popolon mian mortan – per la rigard' dolora,  
Kaj kantos mi... ho jes!... kaj la harpon ludos  
laŭte!

## Ni memoras.

Tago de memoro aŭ “Tago de memoro pri la viktimoj de holokaŭsto” estas internacia memorigo celebrenda ĉiujare la [27-an de januaro](#), iniciatita de Unuiĝintaj Nacioj 1-an de novembro de la jaro 2005. Grava estis omaĝo kaj honoro por memoro de la viktimoj de holokaŭsto kaj de tiuj, kiuj riskis aŭ reale perdis la vivon por protekti judojn persekutitajn.

La daton oni elektis, ĉar ĝi koincidas kun la datreveno de liberigo de la plej granda koncentrejo [Auschwitz-Birkenau \(Aŭŝvico\)](#), simbolo de teroro kaj homekstermado, kiu okazis la 27-an de januaro 1945 fare de la sovetunia Ruĝa Armeo.

Nemultaj personoj sukcesis travivi koŝmaron de holokaŭsto, pereis preskaŭ ĉiuj. Oni prikalkulis la viktimojn kaj ricevis nombron 6 milionoj da personoj, el kiuj duonon formas polaj judoj. Detruitaj arkivoj kaj forviŝado de informoj malhelpis fiksi precizan nombron de tiuj, kiuj pereis.

„Tago de memoro pri la viktimoj de holokaŭsto estas defio kaj morala ordono: ni devas fari ĉion por jam neniam foliojn de historio oni ne distranĉos per tranĉilo de Kaino, kaj la mondo fariĝu la hejmo por homoj. Ni bruligu kandelojn en fenestroj la 27-an de januaro kune kun komenco de ŝabato. Por flamo de memoro lumigu niajn rememorojn kaj pensojn pri tiuj, kiuj foriris.” – skribis en invito por unua aranĝo Golda Tencer, aktorino kaj ĝenerala direktorino de fondaĵo Shalom.

Memoro pri viktimoj de hitleranaj murdoj dum la dua mondmilito estas omaĝata de la fondaĵo ek de 2006 j. Sub monumento al Herooj de Geto metas florojn reprezentantoj de ŝtataj regoj, sociaj kaj religiaj organizaĵoj kaj junularo. Reprezentantoj de diversaj religioj kaj eklezioj ekumenie preĝas por tiuj, kiuj pereis. Al oficialaj aranĝoj akompanis arta parto, en kiu partoprenis i.a. mondfama kantoro Israel Rand, popularaj polaj aktoroj kaj ensemblo de Juda Teatro al Estera Rachel kaj Ida Kamiński. En la jaro 2010 oni prezentis „La kanton pri la murdita juda popolo” de Ichok Kacnelson. Daŭra parto de ĉiujara aranĝo, nomata „Flamo de la Memoro” estas bruligi kandelojn, ĉar lumo reigas la vivon kaj de ni dependas por ĉi lumo ne estingu.

Ek de 2011 ĉiuj viktimoj de Shoah estas rememortaj en „Apelo de Memoro”. Nomoj de ili oni legas sur la strato Prózna (parto de iama geto). 26-an kaj 27-an de januaro sur stratojn de Varsovio elveturas malplena antikva tramo kun stelo de Davido. Ĝi rememorigas al la loĝantoj de la ĉefurbo pri judaj najbaroj, kiuj pereis en getoj kaj koncentrejoj.

Emanuele Rovere

## Tago de la memoro.

La 27-an de januaro 1945, okazis la liberigo de la ekstermin-koncentrejo en la pola urbo Oświęcim-Brzezinka (Auschwitz-Birkenau).

En la jaro 2005-a, Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke tiu tago estu, ĉiujare kaj internacie, dediĉata al la Memoro de la Viktimoj de Holokaŭsto, por honorigi la pli ol ses milionojn da viktimoj de la naziismo dum la dua mondmilito.

Mi esperantigis faman, italan kanton, jam antaŭ naŭ jaroj, sed ŝajnas, ke ne multaj germanoj, poloj, kaj judoj ĝin ekŝatis - kaj nur ili scias la kialon.

Por ne forgesi... sed tamen pardoni... Kanto „Auschwitz” verkita de la italo Francesco Guccini. Esperanta teksto kaj muzika aranĝo: Emanuele Rovere (Manŭel). Gitar-solisto: Michele Pirona. Kantas: MANŬEL.

<https://www.youtube.com/watch?v=IKQDJ6-IcHI>

## Blovas!

Lastatempe turmentas nin, kiel la tutan Eŭropon maltipaj por jarsezonoj veteroj. Al tra malagrablaj kaj ankaŭ malsekuraj aferaĵoj apartenas fortaj ventoj. Antaŭ ol la homaro eksciis, ke paŭzo de la vento estas diferencoj en la aerpremo – mitologioj de diversaj sistemoj strebis tiun aferaĵon klarigi.

Antikvaj civilizoj vidis en ventoj diajn estaĵojn, al kiuj oni oferis donojn por certigi al si bonan rikolton kaj sekuran navigadon. Precipe navigistoj kaj estroj de militflotoj estis emaj omaĝi ventojn, ĉar de ili dependis ilia vivo kaj profitoj. Ventoj ricevadis antaŭ militoj kaj komercaj ekspedicioj oferojn el nigraj ŝafinoj. Dajmono de vento en antikva Grekio estis Eolo, kiu loĝis sur Eolaj Insuloj kaj rolis en Odiseo de Homero.

La norda vento Boreo malvarma, sed salubra kaj efika por Eŭropo kaj Malgrandazio, al Afriko alportas nubojn kaj pluvojn. Vaste konataj en folkloroj de Eŭropo kaj Azio rakontoj pri donacoj de la norda vento konserviĝis en multaj fabeloj i.a. ĉe fratoj Grimm. Malriĉulo en ili ricevas magiajn objektojn kiel saketo, kiu mem pleniĝas per oraj moneroj, tableto, sur kiu aperas dezirataj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, besto (azeno), kiu scipovas igi oron el sub la vosto, bastonoj, kiuj laŭ la deziro mem batas malamikon. Homoj, kiuj naskiĝis ĉe la norda vento havos vivon malkvietan kaj militeman.

La orienta vento Eŭroso, seka, foje humida blovanta aŭtune kaj vintre, en Palestino estas opiniata kiel plago (precipe fama *chamsin*). Tiuj, kiuj naskiĝis ĉe ĝi neniam spertos mizeron.

Vento norda-orienta Euroakvilo forta kaj malvarma, blovanta en mediteranea marbaseno portas detruon, tempestojn, peston kaj aliajn infektojn, sekigas fruktojn. Oni menciis pri ĝi en Biblio

Vento suda – Notoso, tempesta kaj varma alportas al Grekio nebulon, humidon kaj pluvon, blovas komence de somero, estas malbona por sano, malfaciligas bredadon de bruto. Homoj, kiuj naskiĝas ĉe ĝi estos societemaj kaj jovialaj.

Zefiro, vento okcidenta, por Grekio tempesta kaj pluva, por okcidentaj landoj belvetera kaj milda, blovas printempe kaj montras, ke oni jam povas komenci navigadon. Kiu naskiĝis ĉe tiu vento estos malriĉa.

Eolon precipe omaĝis romanoj, kion pravas Vergilio en Eneido. Pli postaj poetoj faris lin reĝo de ventoj. Odino – ĉefa dio de mitologio germana (Votano) primare povis esti ankaŭ dio de temesto kaj ventoj.

Laŭ tradicio de la irana mazdaismo vento subtenas Universon kaj regulas ĝian ekvilibron moralan kaj fizikan. En tradicio muzulmana ventoj subtenas per flirtado de multegaj flugiloj prakvojn apogantajn tronon de Alaho.

Certaj antikvaj dioj kaj herooj scipovis regi super ventoj. Al ili apartenis ekz. Hermeso (Mer-kuro), konstristo Trafonioso, kantisto kaj komponisto Linoso kaj reĝo de Teboj, edzo de Niobo – Amfiono.

Al revelacio de Dio akompanas ofte ventego aŭ ciklono. Vento – Dia Spirito ŝvebis komence super akvoj: (Biblio, Libro de Genezo 1,2; hebrea *ruah* signifas vento, movo kaj spiro). Keruboj aperas al profeto Ezekielo en impeta ventego norda. Sendo de la Sankta Spirito okazas inter susurego de forta vento. Dio parolas al Ijobo "el inter ventego".

Vento estas demonstracio de diaj sentoj, precipe kolero. Ekz. "Je rigardo de Dio ekskuiĝos montoj kaj vento suda blovi ekos."

Vento igas la profetajn kaj aŭgurajn ekstazojn: vento susuranta en folioj de kverko eldiradis profetaĵojn en aŭgurejo de Zeŭso en Dodona. Vento-spiro de Dio donas vivon. Vento kaj spiro la same nevideblaj kuniĝas en simboliko kaj nomo (gr. *Pneuma* = spirito, spiro, ekblovo, vento, animo, inspiro). "Sinjoro ekspiris en vizaĝon de la unua homo spiron de la vivo – kaj fariĝis homo estaĵo viva" (Gen. 2,7).

Vento montras liberon, sendependon, liberon de la spirito. "Vento kie volas, blovas" (Ev. laŭ Johano 3,8)

La favora vento estas simbolo de favoraj cirkonstancoj. Ili povas ŝanĝiĝi kun la ŝanĝema vento.

Scii de kie blovas vento signifas senti kio okazas kaj kiaj estos eventualaj ŝanĝoj.

Vento bildigas rapidon. Ekzistas multe da diraĵoj pri tiu eco. Rapidegi, kuri kiel vento, kun vento vetkuri, konkuri, ŝvebi sur flugiloj de la vento. Tre rapidaj ĉevaloj laŭ ĝenerala opinio estis filoj de ventoj Boreo aŭ Zefiro.

Ventoj estis senditoj de dioj kaj homoj. Aspekton de vento prenis i.a. Zeŭso, Heraklo, Odino kaj unupieda dio de fulmo en majaa mitologio – Hurkano.

Vento simbolas energion, impeton, afektivon. "Forpeli al kvar ventoj"(Ezekielo17,21), "Kaj kiel longe ventego impeta estos paroloj de buŝo via?"(Ijobo 8,2), "Kiu semas venton, rikoltas

tempeston", proverbo laŭ Ozeo (8,7), "Kontraŭ vento malfacile iri", "Milda venteto ekbrulas fajron, impeta – estingas" (Kuracilo kontraŭ amo 807 de Ovidio).

Vento estas voluptemo kaj lascivo. Boreo gravedigis ĉevalinojn. Zefiro pasie amoris kun Hiacinto. "Leviĝu vento norda, eksaltu vento el sudo, trablovu mian ĝardenon, [...] venu mia amata al sia ĝardeno kaj manĝu superbajn frukojn de ĝi" (Kanto super kantoj 4,16). "Vento lasciva, kiu dum sia traflugo kutimis ĉion kisi" (Ŝekspiro, Otello 4,2).

Vento bildigas tempon. "Tempo-vento: malgrandan kandelon estingos; Granda brulo en vento eksplodon atingos" (A. Mickiewicz, Sinjoro Tadeo 10,352-3, trad. A. Grabowski).

Ligoj inter vento kaj malstabilo, hezitemo konserviĝis en multaj diraĵoj ekde antikvaj tempoj. Flageto sur vento – homo facile ŝanĝanta vidpunktojn. Folio sur vento – homo malfirma "Stulte plendi pro malfirmeco de vento" (Ovidio).

Literaturaĵoj kaj diraĵoj parolas ankoraŭ pri ligoj de vento kun klaĉo, kalumnio, malbonŝanco, maldankemo, muziko, kanto. "Vento en okulojn" – malfavoraj cirkonstancoj, kontraŭaĵoj, malgrablajoj.

Vento en sonĝo signifas ĉiam ŝanĝon aŭ gravan eventon. Se ĝi estas milda – oni povas esperi bonan tempo-periodon por fakaj aferoj. Se ĝi blovas tempeste – aŭ proksimiĝas malfeliĉo aŭ fiaskos fakaj planoj. Vento en sonĝo povas averti antaŭ viro je du vizaĝoj.

Tiuj, kiuj naskiĝas dum la senventa vetero estos stultuloj.

Laŭ: Władysław Kopaliński. Vortaro de simboloj kaj Herder. Leksikono de simboloj prilaboris Lidia Ligeza

Lafcadio Hearn

## **Kwaidan. Rakontoj nekutimaj. Formikoj**

En provinco Taishu en Ĉinio vivis iam la pia homo, kiu ĉiutage, dum multaj jaroj, arde omaĝis iun diinon. Iun matenon, kiam li preĝis, bela virino en flava vesto aperis en lia kamero kaj ekstaris antaŭ li. Tre mirigita, li demandis, kion ŝi deziras kaj kial venis senanonce, kaj ŝi diris:

– Mi ne estas virino, sed diino, kiun vi tiel longe kaj arde adoras kaj mi venis, por pruvi, ke via sindono ne estis vana. Ĉu vi konas lingvon de formikoj?

– Malalte naskita kaj neklera homo mi estas – li respondis. Mi ne konas eĉ lingvon de homoj el pli alta stato.

Aŭdinte tion la diino ekridetis kaj eltiris el sub la vesto skatolon similan al ujoj por incenso, kaj elĉerpinte el ĝi iomon da ŝmiraĵo, grasis orelojn de la homo.

– Kaj nun – ŝi ordonis – provu trovi formikojn, kiam vi ilin rimarkos, kliniĝu kaj atente aŭskultu ilian interparolon. Vi ĝin ekkomprenos kaj ekscios ion, de kio vi profitos. Memoru nur, por ne timigi formikojn aŭ ne iriti. – Post tiuj vortoj ŝi malaperis.

La homo senprokraste komencis la serĉadon. Sed apenaŭ sukcesis transpaŝi la sojlon de la domo, rimarkis du insektojn sur ŝtona soklo de unu el fostoj. Li kliniĝis kaj mire konstatis, ke aŭdas kaj komprenas ilian interparolon:

– Ni provu trovi pli varman lokon – voĉis la unua formiko.

– Pli varman lokon? – miris la dua. Ĉu ĉi tiu ne estas bona?

– Tro humida ĝi estas kaj malvarma. Oni enfosis ĉi tie grandan trezoron, kaj la teron ĉirkaŭ ĝi la suno varmigi ne povas.

Ambaŭ formikoj foriris, kaj la homo ekkuris pro ŝpato.

Fosante apud la soklo li preskaŭ tuj trafis kelkajn grandajn potojn plenajn de oraj moneroj kaj dank' al ili li fariĝis eksterordinare riĉa.

Pli poste ankoraŭ ne unufoje li strebis aŭskulti formikojn, sed neniam jam ekaŭdis ilian parolon. La ŝmiraĵo de la diino apertis liajn orelojn por ilia sekreta lingvo apenaŭ je ĉi tiu unu tago.

tradukis Lidia Ligeza